

| | | |
|---|---|---|
| Esperanto-kurso<br>por progresantoj | Dato: 16.3.1<br>Versio: 1 | Xosé Conde<br>CC BY NC SA |

# 13. -ig-kaj -ig-: profundigaj ekzercoj

Memoru pri la problemaj verboj:

| <br> | <br> |
|---|---|
| **Du-ligaj verboj (transitivaj)** | **Unu-ligaj verboj (ne transitivaj)** |
| | fermiĝi |
| bruligi | komenciĝi/finiĝi |
| haltigi | ŝanĝiĝi |
| pasigi | pasi |
| daŭrigi | okazi |
| | aperi |

1. Metu la taŭgajn verbojn en la truojn

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| finiĝis | aperis | haltigi | pasigis | malfermis | daŭrigis | malfermiĝis |
| ŝanĝiĝis | bruligis | fermis | pasis | okazis | aŭdiĝis | |

En la placo ............... granda fajra spektaklo. Dum multaj minutojn ...............nur muziko, sed subite ...............ligna domo kiu estis sur la scenejo kaj ...............du aktoroj. Ili ofte ...............kaj ...............la pordojn kaj la fenestrojn de la domo kaj ĝia aspekto tute ...............dum la seanco. Fine unu el la aktoroj ...............alumeton al la alia kaj li ...............la lignan domon. Estis vere bela, sed iom danĝera.

Kiam la fajro-spektaklo ...............ni foriris de la placo. Preskaŭ alveninte al la bushaltejo ni provis ...............buson, se ĝi ...............antaŭ ni kaj ...............sian vojaĝon. Mi iĝis furioza kaj revenis hejmen per taksio.

2. Nun vi: skribu kelklinian rakonteton uzante la jenajn verbojn: okazi, aperi, finiĝi (aŭ komenciĝi), ŝanĝiĝi, bruligi, haltigi, pasi, pasigi, daŭrigi, fermiĝi (aŭ malfermiĝi)


# Atentu!

Ne ĉiam du-liga verbo havas komplementon kun n-finaĵo. Rigardu:

- Li komencis fumi tre juna

...Sed estas facile scii ke temas pri du-liga verbo ĉar ni povas konstrui la jenan frazon:

- Li komencis ion




Aliflanke, ne ĉiam kiam estas komplemento kun n-finaĵo temas pri rekta objekto en du-liga verbo. La n-finaĵon oni uzas ankaŭ por aliaj funkcioj. Rigardu:


- La supo kuiriĝis la tutan matenon

...Sed ni scias ke kuiriĝi ne povas esti du-liga verbo ĉar havas la sufikson -iĝ- kaj ni ne povas konsrui la jenan frazon:

- ~~La supo kuiriĝis ion~~ (!?)


Temas, do, pri unu-liga verbo:

- La supo kuiriĝis.






# Ekzercoj

3. Decidu ĉu la jenaj verboj estas unu-ligaj aŭ du-ligaj

| Frazo | Du-liga verbo (transitiva) | Unu-liga verbo (ne transitiva) |
|---|---|---|
| |  |  |
| Ĉu la vendejo malfermiĝas ĉi-vesperon? | | |
| Post la kafo li komencis kanti | | |
| Ĉu jam finiĝis la kuko? | | |
| La ĉielo ŝanĝiĝis la lastan vesperon tre rapide | | |
| Ĉu jam pasis la buso ĉi tiun matenon aŭ ne? | | |
| Okazas E-kongreso ĉiujare | | |
| Se vi ne fermas la fenestrojn aperos multaj kuloj en la tuta domo | | |
| Kiu bruligis la librojn? | | |

| | | |
|---|---|---|
| Haltigu la maŝinon! | | |
| Post la akcidento mi ne povas daŭrigi la vojaĝon | | |
| Kiom da tempo vi pasigis ĉe la marbordo? | | |

4. Metu la n-finaĵon kie necesas kaj diru ĉu la verbo estas unu-liga (ne transitiva) transitiva aŭ du-liga (transitiva):

| Frazo | Du-liga verbo (transitiva) | Unu-liga verbo (ne transitiva) |
|---|---|---|
| |   |  |
| Kio_ amuzas mi_ estas la rok-muziko | | |
| Ŝi_ nomis la bebo_ Petro | | |
| Ĉu mortis la poeto_? | | |
| Ne veku mi_ antaŭ la oka | | |
| Aperis tre granda truo_ sur la strato | | |
| Kiam bolos la akvo_ aldonu la viando_ al la poto_ | | |
| Brulu la ligno_ - li laŭte anoncis | | |
| Ĉu vi_ aŭdis tiu_ terura_ bruo_? | | |
| Pendas bantuko_ de la ŝnuro | | |
| Ĉu ankoraŭ daŭras la koncerto_? | | |
| Doloras al mi la kapo_ | | |
| Verŝajne falis la turo_ de la preĝejo | | |
| Ĉu vere tio_ ne interesas vi_? | | |
| Kiam okazis tio_, mi_ tute ne konsciis | | |
| Pasas la monatoj_ kaj mi komencas iĝi nervosa_ | | |
| Veturu vi_ kun Karlo | | |

5. Uzu la ĝustan verbon aldonante iun sufikson se necese

| | |
|---|---|
| En tiu epoko Esperanto tute ne *............is* min | interesi |

| | | |
|---|---|---|
| Esperanto-kurso<br>por progresantoj | Dato: 16.3.1<br>Versio: 1 | Xosé Conde<br>CC BY NC SA |

| | |
|---|---|
| Nitra ne multe ............*is*de kiam mi ne loĝas tie | ŝanĝi |
| Ni ............*is*vespermanĝi tre malfrue | komenci |
| Je kioma horo ............*as*la vendejo? | fermi |
| Parolu pli mallaŭte se vian filon vi ne volas ............*i* | veki |
| Certe: ............*as*bruo la tutan tempon | audi |
| Se vi zorgas pri la planto, ĝi ............*os*granda kaj forta | fari |
| Kiam ............*as*la unua periodo por aliĝi a la kongreso? | fini |
| Bonvolu ne ............*i*: ni laboras | ĝeni |
| Ĝi ............*is*tro multan tempon kaj nun ne estas manĝebla | kuiri |
| ............*is*granda grupo da homoj por rigardi la akcidenton | Kolekti |
| Ĉu ankoraŭ ne ............*is*? | komenci |
| Ne zorgu: mi ............*os* | fari |
| Marta, pri kiu li ............*as*, komplete fajfas pri li | interesi |
| Planu, ............*u* kaj enspezu la monon | konstrui |
| Ĉu vi ............*is* aŭ ne? | fini |
| Li ............*is* dum tri horoj kaj nun estas laca | kuiri |
| Kion vi ............*os* en la urbo, vi ne plu ............*os* | perdi, trovi |
| Francio ............*is* kelkajn leĝojn dum la lastaj jaroj | ŝanĝi |
| Tiujn paperojn ne ............*u*, sed tiujn aliajn jes | rompi |
| Mi ne vidas kion li ............*us* | malfermi |
| ............*u* vi, kiu havas ruĝan ĉapelon | turni |
| Rigardu: ............*is* la katidoj kaj trinkis la lakton | veki |
| Mi ............*is* ke la registaro ............*os* la regulojn | aŭdi,ŝanĝi |
| Ĉiujn vestaĵojn ............*is* mi, li nur helpis | vendi |
| Ĉi tie ............*as* poŝtelefonoj tre facile | vendi |
| Mi venis, ............*is* kaj venkis | vidi |